Se estus mi pentristo

(Al G.N.)

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

Se estus mi pentristo
mi pentrus ne pejzaĝon,
sed vian nur vizaĝon
kaj estus mi persista.

Se mi komponus kantojn
do, komponaĵon ĉiun
nur al la nomo via
dediĉus mi konstante.

Rf - I: Sed, homo ordinara
mi estas en la vivo.
Kaj kredas mi naive
ke vi min amas kara.

Teneron mi enmetus
De tuta mia koro
en versojn pri amoro
Se estus mi poeto.

Se estus mi pentristo
mi pentrus ne pejzaĝon,
sed vian nur vizaĝon
kaj estus mi persista.

Rf - I: